

II

La „Railtroublers“oj

En la teritorio Wyoming, proksime al la fonto de la Yellowstone River, meze en la pratempa, fabele bela rokmontaro estas la nacia parko de la Unuiĝintaj Ŝtatoj, naturrezervejo de 8 670 kvadrataj kilometroj, miraklando, kia tutcerte ne estas trovebla duan fojon en la tuta mondo. La unuajn necertajn raportojn pri tio ricevis generalo Warren en la jaro 1856. Per tiuj li sentis sin esti igita pretigi ekspedadon tien, kiu sed bedaŭrinde ne atingis ĝian celon. Maljam dek jarojn poste sukcesis aliaj, almenaŭ parte malkaŝi la trezoron, kaj antaŭsentigi la mondon pri riĉa, neniam ekspektita abundeco de la plej belaj mirakloj de la naturo. En la somero de la jaro 1871 profesoro Hayden sukcese antaŭeniĝis, kaj liaj raportoj, kvankam objektivaj kaj senpasiaj, entuziasmigis la kongreson de la Unuiĝintaj Ŝtatoj al la decido, deklari tiun mirakle belan landon esti nacioparko, kaj tiel forteni ĝin de la ordinara ŝakrado.

Transe de la vastaj okcidentaj prerioj, ankoraŭ longadistance malantaŭ la altaĵoj de la Black Hills, altiĝas la gigantecaj muroj de la rokmontaro al la ĉielo. Oni emas diri, ke tie ĉi ne agadis la mano, sed la pugno de la kreinto. Kie estas la ciklopoj, kiuj kapablis konstrui tiajn bastionojn? Kie estas la titanoj, kiuj povis stoki tiajn pezegaĵojn ĝis super la nuboj? Kie estas la majstro, kiu kronis tiujn pintojn per ĉiama neĝo kaj glacio? Tie ĉi la kreinto altiĝis „memorigilon de liaj mirakloj“, kiu ne povis esti pli efektige kaj pli kortuŝe.

Kaj malantaŭ tiuj gigantaj muroj ankoraŭ hodiaŭ moviĝas kaj bolas, vaporas kaj muĝas malsupren el la bolantaj profundaĵoj de la teroj. Tie la maldika terkrusto kreas bobelojn, tie siblas arde varmegaj sulfovaporoj alten, kaj kun bruego, kiu similas al kanona tondro, grandegaj gejseroj ŝprucas iliajn bolantajn akvamasojn en la vibrantajn aerojn. Magmaj kaj vulkanecaj fortoj batalas kontraŭ la suna lumo. La subtera mondo malfermas sian faŭkon de unu minuto al la alia, pro elkraĉi la fajron de la profundeco kaj ensuĉi la aĵojn de la luma tago en la muĝantan faringon.

Tie ĉi ofte ĉiu paŝo estas ligata al mortigaj danĝeroj. La piedo povas rompi tra la trompa krusto, la vaporanta kirlaĵo trafi la lacan migranton, la subfosinta roko falegi

kun la restanto en la faŭkan abismon. Sed tiuj mortigaj kampoj iam vidos milojn da pilgrimantoj, kiuj serĉas kuracon de iliaj suferoj en la varmegaj fontoj kaj ozonhavaj aeroj, kaj tiam oni eble ankaŭ malkaŝos tiujn miraklajn valojn kaj fendojn, en kiuj la avara soleco deponis fabelajn trezorojn de ŝtonoj kaj aliaj valorajoj. —

Eta negoca afero irigis min al Hamburg, kie mi renkontis konatulon, kies aspekto subite revivigis malnovajn memorojn en mi. Li estis el St. Louis, kaj kune ni estis akirintaj decajn pecojn da ĉasviando en la marĉoj de la Mississipi. Li estis riĉe, tre riĉe, kaj ofertis senkoston transŝipiron al mi, se mi estus volinta fari la komplezon al li akompani lin al St. Louis. Jen la preria febro ekkaptis min per ĉia venka forto. Mi akceptis, kablis hejmen, pro plej rapide alportigi miajn pafilojn kaj aliajn provizaĵojn, kaj kvin tagojn post nia revido ni jam naĝis sur la Elbe al la oceano.

Transe ni unue profundigis kelkajn semajnojn en la arbarojn de la malsupra Missouri. Tiam mia kunulo devis reeniri, dum mi veturis kontraŭflue al Omaha, pro plue antaŭeniĝi per la granda Pacific:a fervojo okcidenten.

Mi havis miajn bonajn kaŭzojn iri ĵus laŭ tiu vojo. Mi konis la rokmontaron de la nordo de Montana ĝis transe al la Mapimi-dezerto, sed neniuj vojoj estis farintaj tian impreson al mi kiel tiu inter Helena kaj la Nordparko. Ĉar ĵus tie serĉendas la plej strangaj ejoj de tiu montaro: la Teton Range, la Windriver:aj montoj, la South Pass, kaj tute aparte la fontejoj de la Yellowstone River, de la Serpentrivero kaj de la Green River.

Per tiu kaŭzo ankaŭ tiun fojon ĝi logis min en la ripete vizititan regionon. Tien venas neniuj homoj, escepte de la kaŝiranta indiano aŭ la riskema *trapper*, kaj la logo estas preskaŭ nerezisteble fari la aŭdecaĵon eniĝi en tiujn valetojn kaj *cañon*:ojn, kiuj estas loĝataj laŭ la legendoj de la ruĝuloj de malicaj spiritoj.

Certe tio ne tiel facilis, kiel ĝi rakontebblas. Kiajn klopodajn kaj ampleksajn pretiĝojn faras nur la vojaĝanto al Svislando, antaŭ li komencas grimpi sur unu el la montoj de la Alpoj! Kaj kio estas lia intenco, rilate al tiu de sola okcidentulo, kiu riskas kun fido nur pri si mem kaj sia bona pafilo iri en danĝerojn, pri kiuj la civilizita eŭropa migranto eĉ ne havas ideeton! Sed ĵus estas tiuj danĝeroj, kiujn logas kaj ravigas la ĉasiston. Liaj muskoloj estas el fero kaj liaj tendenoj el ŝtalo, lia korpo rezistas al ĉiuj penoj kaj mankoj, kaj ĉiuj efikiĝoj de lia menso akiris per senĉesa provado eltenkapablon kaj akrecon, kiu igas lin trovi saviĝan rimedon eĉ en la plej granda mizero. Tial li neniam restadas en civilizitaj ejoj, kie li ne povas uzi kaj utiligi siajn kapablojn. Li devas iri eksteren sur la senliman savanon, ene en la mortigajn abismojn de la montaro, kaj ju minace la danĝeroj ŝtormas al li, des pli li sentas sin esti en la propreca fako, des pli kreskiĝas lia kuraĝo, des pli altiĝas lia memkonfido, kaj des pli li restas je la konvinkiĝo, ke li estas ankaŭ en la plej sovaĝa soleco kondukata per mano, kiu estas pli forta ol ajn ia monda forto.

Mi ja estis bone pretiĝinta pro tiu plano. Mankis nur unu aĵo al mi, sen kiu estas preskaŭ neeble teniĝi en la *‘dark and bloody grounds’* — bona, prifidebla ĉevalo. Sed tiu manko ne kaŭzis kapdoloron al mi. La maljuna valafio, kiu estis portinta min dum la ĉasado ĉe la malsupra Missouri, estis vendita de mi baldaŭ poste, kaj en Omaha mi sidigis en la fervojan vagonon kun la fiksa konvinkiĝo, ke mi ja ricevus bonan ĉevalon tuj kiam mi bezonis ĝin.

Tiutempe en tiu fervojo ankoraŭ estis interspacoj, kiuj estis nur kondiĉe vetureblaj. Tial oni ĉiam ankoraŭ vidis laboristojn je la vojo, kiuj estis okupataj plifortigi pontojn kaj transpasilojn, aŭ replibonigi tiujn punktojn, kiuj jam damaĝiĝis. Tiuj homoj, se ili ne laboris en la proksimo de unu el la urbetoj, kiuj tiutempe kvazaŭ kreskis el la tero kiel fungoj, kutime starigis *camp*:on, restejon, kiuj havis kelkajn fortikaĵojn. Tio necesis pro la indianoj, kiuj supozis la konstruadon de la fervojo esti ofendo de iliaj rajtoj, kaj provis malebligi aŭ almenaŭ malfaciligi ĝin en ĉia maniero.

Sed estis ankaŭ aliaj kontraŭuloj en tiuj regionoj, kiuj preskaŭ estis pli timindaj ol la ruĝhaŭtuloj.

Sur la prerio amaso da fiularoj ĉirkaŭmigris, kiuj konsistis el la figuroj, kiujn la civilizita oriento estis elpelinta, pridubindaj karakteroj, kiuj ĉiurilate malsukcesis, kaj al kiuj nun nenio ekspektendis de la vido. Tiuj homoj kunbandiĝis foje pro tiu, foje pro alia krima celo, kaj estis eĉ pli danĝeraj ol la plej sovaĝaj indianaj trupoj. Je la tempo de la fervoja konstruado ili celis koncentrite al la *camp*:oj, kiuj estiĝis laŭ la fervojo, kaj tial ne estis miriga, ke tiuj *camp*:oj ricevis fortikaĵojn, kaj ke iliaj loĝantoj kunhavis armilon eĉ dum la laboro.

Pro la atakoj, kiujn tiuj rabistoj faris al la *camp*:oj kaj vartrajnoj, dum kiuj ili kutime damaĝis la relojn pro haltigi la trajnon, ili estis nomataj *railtroubler*:oj, reldetruistoj. Oni akre atentigis pri ili, tiel ke ili fine nur povis fari iliajn atakojn nur, kiam pluraj trupoj estis kuniĝintaj, do povis supozati sin esti sufiĉe nombre. Cetere estis tia kolero kontraŭ ili, ke ĉiu kaptita *railtroubler* devis ekspekti la certan morton. Tiuj bandoj murdis sen diferenco inter aĝo aŭ sekso, kaj tial ankaŭ ili ne povis ekspekti tute nenian kompaton.

Estis je la tagmezo, kiam ni forlasis Omaha:n per la trajno. Inter la kunvojaĝantoj estis tute neniu, kiu koncentrigis mian atenton pli longe ol intertempe. Nur pli poste en Fremont envagoniĝis viro, kies ekstero tuj direktigis mian intereson al li. Ĉar li sidigis tre proksime al mi, mi havis la plej bonan eblecon rigardi lin detale.

Lia aspekto certe estus kaŭzinta kelkan kapskuadon en la urboj de la oriento. En la okcidento oni sufiĉe kutimiĝis al tiaj fenomenoj. La viro havis malgrandan figuron, sed estis sufiĉe dika. Li surhavis ŝafpelton, kies kruda flanko estis turnigita eksteren. Tiu kruda flanko estis pli antaŭe kovrita per haroj, sed nun la lano estis malaperinta, kaj nur tie kaj tie oni povis vidi etan, solan ereton, kiu estis sur la nuda ledo kiel oazo en la dezerto. Antaŭ tempoj tiu peltaĵo eble ĝustis al la posedanto, sed estis malkreskinta per la influo de neĝo kaj pluvo, de varmego kaj malvarmego tiel, ke ĝia malsupra rando ne plu atingis la genuon. Ĝi ne plu povis esti fermbutonumita, kaj la brakumoj estis reeniĝintaj ĝis al la ejo de la kubutoj. Sub tiu pelto oni vidis ruĝflanelan jakon kaj ledpantalono, kiu tutcerte iam estis estinta nigre, sed nun brilis en ĉiuj koloroj de la pluvarko kaj supozendis, ke ĝia sorto estis servi al la posedanto kiel viŝ-, buŝ- kaj naztuko. Malsupre de tiu pratempa pantalono oni povis vidi la nudajn, blue frostitajn maleolojn de la viro, kaj tiam paron da ŝuoj, kiuj povis elteniĝi tutan eternecon. Ili estis tranĉitaj el bovledaj botoj kaj havis duoblajn plandojn, en kiujn estis batitaj tiel dikaj najloj, ke oni povis piedbati krokodilon ĝismorte per ili. Sur la kapo la viro havis ĉapelon, kiu aparte de la formo ankaŭ estis perdinta la randaĵon. Ĉirkaŭ liaj koksoj estis

malnova ŝalo, kies koloro sed tute estis neestigiĝinta. En tiu estis praaneca rajdista pistolo kune kun *bowie*-tranĉilo. Flanke de tiuj armiloj pendis kugla kaj tabaka saketo, malgranda spegulo, kian oni aĉetas je germanaj kermesoj pro dek *pfennig*-oj, ĉirkaŭtrik-ita ladbotelo kaj kvar patentaj hufoferoj, kiuj povas esti almetataj kaj fikssraŭbataj al ĉevaloj kiel ŝuoj. Flanke de tiuj mi vidis ungon, kies enhavo nun ankoraŭ estis kaŝata al mi. Pli poste mi eksciis, ke ĝi enhavis kompletan razilaron.

Sed la plej stranga aĵo pri tiu viro estis lia vizaĝo. Ĝi estis tiel bonege razita, kvazaŭ li ĵus estis veninta el barbirejo. La preskaŭ rozruĝaj vangoj estis tiel dikaj kaj firmaj, ke la malgranda, mallonga nazeto preskaŭ malaperis inter ili, kaj la du viglaj brunaj okuloj nur klopode povis vidi trans ili. Tuj kiam la pli ol abundaj lipoj malfermiĝis, oni ekvidis du vicojn de blindigaj blankaj dentoj, kiuj sed tuj iĝis sub mia suspekto, ke ili estis falsaj.

Tiel li sidis flanke de mi, kaj tenis kunpremite inter la mallongaj, dikaj elefanto-kruroj pafilaĉon, kiu similis al la Liddy de mia malnova Sam Hawkens kiel unu ovo al la alia.

Li estis sidiĝinta kun simpla „*Good day, Sir!*“ ĉe mi, kaj tiam ŝajne ne plu zorgiĝis pri mi. Maljam unu horon poste li petis pri mia permeso, ke li rajtis fumi pipon. Tio evidentiĝis al mi, ĉar vera, ĝusta *trapper* aŭ kaptilisto neniam demandas, ĉu tio, kio plaĉas al li, estas permesata de aliaj.

„Fumu kiel longe Vi volas, *Sir!*“ mi respondis. Mi ankaŭ fumos. Ĉu Vi volas bruligi unu el miaj cigaroj?“

„Dankon, *Sir!*“ li diris. „Tiuj aĵoj, kiujn oni nomas cigarojn estas tro fajnaj al mi. Mi restas ĉe mia pipo.“

La dikulo havis sian pipon laŭ *trapper*:a kutimo pendante de ŝnuro ĉirkaŭ la kolo. Kiam li estis ŝtopinta ĝin, mi hastis elpoŝigi alumeton. Sed li rifuze skuis la kapon, igis la manon en la poŝon de la pelto, kaj aperigis unu el tiuj preriaj fajriloj, kiuj estas nomataj *punks* kaj enhavas sekan arban mucidaĵon kiel meĉaĵo.

„Ankaŭ tiaspeca novtempa elpenaĵo, tiuj alumetoj, kiuj ne taŭgas pro la savano“, li komentis. „Oni ne dorlotu sin mem.“

Per tio la mallonga interparolo estis finigata, kaj la dikulo ŝajne tute ne havas eĉ la plej malgrandan emon komenci kroman. Li fumis herbaĵaĉon, kies odoro vigle memorigis min pri juglandaj folioj, kaj dum tio li koncentrigis sian tutan atenton al la pejzaĝo. Tiel ni atingis la stacion North Plate ĉe la kuniĝejo de la North kaj South Plate River. Tie ĉi li elvagoniĝis mallongan tempon, kaj faris ion ĉe la plej antaŭaj vagonoj. Mi rimarkis, ke ĉevalo troviĝis en tiu, verŝajne lia rajdbesto.

Kiam li estis reenvagoniĝinta kaj la trajno reekmoviĝinta, li plutenis sian silentadon, kaj maljam, kiam ni haltis je noktomezo en Cheyenne ĉe la bazo de la Laramie Mountains, li demandis:

„Ĉu Vi eble veturos per la Colorado-trajno de tie ĉi al Denver, *Sir?*“

„Ne“, mi respondis.

„*Well*, do ni restos najbaroj...“

„Ĉu Vi longe vojaĝos per la Pacific“ nun mi scivolis.

„Hm! Jes kaj ne — kiel ĝi plaĉos al mi. Kaj Vi, ĉu?“

„Mi volas iri al Ogden.“

„Ha, Vi volas vidi la mormonan urbon, ĉu?“

„Iomete, kaj tiam malsupren al la Windriver-montoj kaj en la Teton Range-on.“

Li ekzamenis min per nekreda vido kaj diris:

„Tien malsupre, ĉu? Tion kapablas nur tre riskema okzidentulo. Ĉu Vi havas akompanantojn?“

„Ne.“

Nun liaj malgrandaj okuletoj vidis al mi preskaŭ amuzigite.

„Ĉu sole? Malsupren al la Teton-montoj? Tien meze inter la suojn kaj la grizajn ursojn, ĉu? Ĉu Vi eble jam iam aŭdis, kion signifas suo aŭ griza urso?“

„Mi pensas, ke jes.“

„Hm! Ĉu mi rajtas demandi, kio Vi estas, *Sir*?“

„Mi estas *writer*.“

„Ĉu *writer*? Skribisto, ĉu? Nu! Vi do faras librojn, ĉu?“

„Jes.“

Nun li ridis plenvizaĝe. Estis, ekzakte kiel antaŭe al la brava Sans-ear, ega amuzo, ke skribisto ekhavis la ideon tute sole kaj helpate nur de si mem viziti la plej danĝeran parton de la rokmontaro.

„Bele!“ li diris subridante. „Do Vi certe volas skribi libron pri la Teton-montoj, mia estimata *Sir*, ĉu?“

„Eble.“

„Kaj Vi certe iam vidis libron, en kiu estis bildo de indiano aŭ urso, ĉu?“

„Memkompreneble“, mi serioze kapjesis.

„Kaj nun Vi kredas, ke Vi povos kunagi tie, ĉu?“

„Certe!“

„Kaj certe Vi ankaŭ kunhavas pafilon, kiu tie estas volvita en Vian kovrotukon, ĉu?“

„Ho jes.“

„Do mi volas doni bonan konsilon al Vi, *Sir*! Plej rapide detrajniĝu kaj urĝu, ke Vi revenos hejmen! Vi ja estas, kiel ŝajnas al mi, forta ulo, sed Vi ja tute aspektas al mi, kvazaŭ Vi ne povus mortpafi sciuron, des malpli urson. La legado ennebuligis Vian kapon. Estus plendige domaĝe pri Via juna vivo, se la ekvido al sovaĝa kateto apopleksiigos Vin. Vi ja certe iam legis Cooper-on, ĉu?“

„Ho, memkompreneble!“

„Tion mi antaŭsciis. Ĉu Vi eble ankaŭ aŭdis pri famaj okzidentuloj?“

„Jes“, mi asertis denove modeste asertis.

„Pri Winnetou, pri Old Firehand, pri Old Shatterhand, pri Sharp-eye aŭ pri la Onklino Droll?“

„Pri ĉiuj“, mi kapjesis.

La dika vireto ne sciis, ke almenaŭ li amuzigis min kiel mi lin.

„Jes“, li diris, „tiaj libroj kaj rakontaĵoj ja boneble legeblas kaj aŭskulteblas. Ĉi ĉio sonas tiel bele kaj facile. Sed, *Sir*, ne pensu malbone pri mi, mi bedaŭras Vin. Tiu Winnetou estas apaĉoĉefo, kiu batalus kontraŭ mil diabloj, se necesus. Tiu Old Firehand

paŝos ĉiun unuopan kulon el la svarmo, kaj Old Shatterhand neniam estis farinta unu mispaŝon, kaj kaĉigas la plej fortan ruĝhaŭtulon per unu bato. Kiam unu el tiuj uloj diras, ke li volas iri supren en la Teton-montojn, tio ja ankoraŭ estas riskaĵo, sed oni tamen taksas, ke li povos sukcesi tion. Kontraŭe Vi — ĉu librofariŝto? *Pshaw!* Kie nu estas Via ĉevalo?”

„Mi ne havas ĉevalon.“

Nun li ne plu povis sin regi. Laŭta ridado ekkrevis el li.

„Neniu ĉevalo, kaj elen al la Teton-montaro! Ĉu Vi frenezas, *Sir?*“

„Mi kredas, ke ne. Kiam mi nun ja ne jam havas ĉevalon, mi ja iam aĉetos aŭ kaptos unu.“

„Ha! Nu kie?”

„Kie ĝi plaĉos al mi.“

„Ĉu Vi, Vi mem volas kapti ĝin?”

„Jes.“

„Tio estas sprite, *Sir!* Vi ja tie havas lazon volvite ĉirkaŭ Viaj ŝultroj, sed per tiu Vi ne kaptos muŝon, des malpli sovaĝan mustangon!“

„Kial?”

„Kial? Nu, ĉar Vi estas tio, kion oni nomas transe en la maljuna lando nurdimanĉa ĉasisto!“

„Kial Vi pritaksas min tiel?”

„Tio ja facilas! Ĉar ĉio je Vi estas tiel delikata kaj pura. Vidu al deca arbarmigranto, kaj komparu lin kun Vi! Viaj alttubaj botoj novas, kaj fakte ili estas frotpoluritaj tute brilige! Via *leggings* estas el la plej fajna alkledo. Via ĉasĉemizo estas majstraĵo de la mano de indiana *squaw*. Via ĉapelo kostis almenaŭ dek du dolarojn, kaj Via tranĉilo kune kun la revolvero tutcerte ne iam dolorigis homon! Ĉu Vi povas pafi, *Sir?*“

„Jes, iomete. Mi eĉ iam estis *schützekenkönig!*“ mi deklaris kun grava mieno.

„Ĉu *schützekenkönig?* Ha, do fine eĉ estas germano, ĉu?”

„Certe.“

„Hm! Vidu jen! Do Vi estas germano, ĉu? Vi do depafis lignan birdon, kaj estiĝis pafista rego per tio, ĉu? Tiel estas la germanoj! Old Shatterhand ja ankaŭ laŭdire estas germano, sed tiu ja nu estas escepto! *Sir*, mi petas Vin elkore, turniĝu reen laŭeble baldaŭ, alikaze Vi pereos!“

„Ni ja vidu, kaj intertempe parolu pri io alia!“ mi cedis. „Kie fakte nun estas tiu Old Shatterhand, pri kiu Vi parolis?”

„Nu, kiu sciu tion! Kiam mi estis en Kansas City antaŭ nelonge, mi renkontis la faman Sans-ear:on, kiu estis rajdadinta kun li. Tiu diris al mi, ke Old Shatterhand estis reirinta transe al Afriko, en la enuigan regionon, kiun oni nomas la dezerton Saharo. Tie li certe klopodiĝas pri la indianoj, kiuj havas la nomon araboj. Tiu viro fakte ricevis sian nomon de tio, ke estas facilaĵo al li terenbati malamikon per la nura pugno. Li faris tion jam ofte. Kontraŭe vidu al Viaj manetoj! Ili estas tiel softaj kaj blankaj kiel la manoj de *lady*. Oni rimarkas tuj, ke Vi nur traktas paperon kaj ne konas alian armilon escepte de la ansera plumo. Pripensu mian konsilon bone, *Sir*, kaj reeniru al la olda

Germany! Nia okzidento ne estas regiono por *gentleman* de Via speco!“

Per tiu averto li finigis la interparolon, kaj mi ne ekprovis daŭrigi ĝin. Estis fakte la kaŭzo, ke mi estis dirinta al Sans-ear, ke mi pli poste volis iri en la afrikan mezorienton.

La unuan stacion, kiun ni ekvidis en la lumo de la sekvinta mateno, estis Rawlins. Malantaŭ tiu loko komencas malabunda, dezerta montara pejzaĝo, kies sola plantokresko estas artemiziaj arbedoj, neplaĉa, malfekunda ebenaĵo sen vivo, sen riveroj aŭ riveretoj, montara Saharo, kiu havas tute neniun oazon. Baldaŭ la alkaloriĉa tero dolorigas per sia blindiga blankeco la lacan okulon; baldaŭ tiu dezerto estas supozata havi sinistran, deprimigan grandecon, kaŭzata per nudaj malkrutaĵoj, sekegaj deklivoj kaj krutaj rokmuroj, kiuj estas disŝiritaj de tempesto, fluego kaj fulmo.

En tiu malgajiga regiono estas la stacio Bitter Creek, kvankam la plej proksima rivereto estas ĉirkaŭ tri mejlojn for de tie. Sed tamen iam tie ĉi evoluigis vigla viveco, ĉar tie ĉi troviĝas neelĉerpeblaj karbejoj, kiuj certigas estontecon al tiu dezerto.

Ni vaporveturis plu, trans Rock Springs kaj plue trans la stacio Green River, kiu situas en rekta lineo certe mil kilometrojn okcidente de Omaha. La malgajiga aspekto de la pejzaĝo ĉesis, la plantokresko rekomencis, kaj la altaĵoj ĉiam pli havis plaĉigan, refreŝigan koloron. Ni ĵus estis transintaj belegan valon kaj veturis eksteren sur liberan, senarban ebenaĵon, kiam la maŝino elpuŝis tiujn orelŝirajn fajfojn en mallonga vico, kiuj indikas minacantan danĝeron. Rapide ni stariĝis de niaj seĝoj. La bremsoj kriis, la radoj kraketis — la trajno haltis, kaj ni saltis el la vagono eksteren sur la sekuran teron.

La aspekto, kiu montriĝis al ni, estis teruriga. Oni ĉi tie atakis trajnon, kiu devis transporti laboristojn kaj provizojn al la okzidento, kaj la relejo estis kovrita de la finbrulintaj kaj duonkarbiĝitaj ruinaĵoj. La atako estis okazinta dum la nokto. *Railtroubler*:oj estis disŝirintaj la relojn, kaj per tio la trajno dereliĝis kaj falegis laŭ la alta taluso. Oni povis facile elpensi, kio okazis sekve. Preskaŭ nur estis restantaj la ferajn partojn de la trajno. Oni estis bruliginta ĉiun vagonon post la elrabo, kaj en la cindro ni trovis la malgajigajn restaĵojn de multaj homoj, kiuj aŭ estis pereinta dum la falego, aŭ poste estis mortigataj de la *railtroubler*:oj. Ŝajne neniu el ili povis saviĝi vivante.

Estis feliĉo al ni, ke nia maŝinisto estis rimarkinta la danĝeron sur la liberan areon ĵus ĝustatempe, alikaze ankaŭ ni estus falegintaj malsupren laŭ la taluso. La lokomotivo haltis nur malmultajn metrojn antaŭ la loko, kie la detruigejo komencis.

La ekscito de la vojaĝantoj kaj de la fervojistoj estis grandega, kaj tute neblas redoni la fortvortojn kaj esprimojn, kiuj ĉie estis aŭdeblaj. Oni traserĉis la ankoraŭ fumantajn ruinaĵojn, sed nenio estis savigebla plu, kaj post la faktoj estis registritaj, oni ne povis fari ion, nur laŭeble rapide repara la relvojon. La necesaj iloj pro tio — kiel ĉiam ĉe ĉiu amerika trajno — tieis. La trajnestro deklaris, ke li devus limiĝi fari raporton ĉe la neksta stacio. La ceteraĵoj, do ankaŭ la persekutado de la krimistoj, tiam estos la afero de la juĝistaro, kiu ĉiukaze tiam estos formigata tie.

Dum la aliaj vojaĝantoj ankoraŭ sennecese traserĉis la ruinaĵojn, mi supozis ĝin esti la plej bona aĵo esplori pri la spuroj de la *railtroubler*:oj. La areo estis libera, per herboj surkreskita, kaj nur de malmultaj arbedoj interrompita ebenaĵo. Mi iris reen kelkan distancon laŭ la relo, kaj tiam faris duoncirklon ĉirkaŭ la akcidentejo, kies bazo estis

la relvoja taluso. En tiu maniero nenio povis resti nerimarkita de mi per kelka atentigo.

En la distanco de eble tricent paŝoj de la akcidentejo mi trovis inter kelkaj arbedoj la herbojn preminte malsupren, kvazaŭ tie estus sidintaj pli granda nombro da homoj, kaj klare videblaj spuroj kondukis min al la loko, kie oni estis kunligintaj la ĉevalojn. Tiun lokon mi detale ekzamenis, pro ekkoni la nombron kaj la specon de la bestoj. Tiam mi esploradis plu.

Je la relvojo mi renkontis mian najbaron el la vagona kupeo, kiu, kion mi nur nun rimarkis, estis ŝajninta ekhavi la saman ideon, kaj traserĉinta la areon maldekstre de la akcidentejo. Li mirigite vidis al mi kaj demandis:

„Ĉu Vi tie ĉi, *Sir*? Kion Vi faras?“

„Tion, kion ĉiu okzidentulo faras, kiam li iĝas en similan situacion: mi serĉis la spurojn de la *railtroubler*:oj.“

„Ĉu Vi? Ha! Vi certe trovos multon! Tiuj estis ruzaj viroj, kiuj sciis, kiel ili forviŝu iliajn spurojn. Mi trovis tute nenion. Kion *greenhorn* kiel Vi nu trovu?“

„Eble la *greenhorn* havis pli bonajn okulojn ol Vi, *Sir*“, mi ridetis. „Kial Vi nu serĉas spurojn sur la maldekstra flanko? Vi volas esti malnova, sperta savanmigranto, sed tamen ne vidas, ke la tereno tie ĉi dekstre taŭgas multe pli bone pro restejo kaj kaŝejo ol tie transe maldekstre, kie troveblas preskaŭ neniuj arbedo.“

Li vidis al mia vizaĝo videble mirigite, kaj tiam diris:

„Hm, tiu opinio ne malbonas. Tia librofaristo ŝajne ankaŭ havas bonan penson intertempe. Ĉu Vi trovis ion?“

„Jes. Tie malantaŭ tiuj aparte altkreskintaj sovaĝaj ĉerizarbedoj ili restadis, kaj tie transe ĉe la juglandujoj staris la ĉevaloj.“

„Ha! Tien mi iru, ĉar Vi ja ankoraŭ ne havas la ĝustajn okulojn pro ekkoni, tiom da ĉevaloj ili estis!“

„Estis dudek ses.“

Denove li rigardis min kun gesto de surpriziĝo.

„Dudek ses, ĉu?“ li ripetis nekredante. „Per kio Vi ekkonis tion?“

„Ĉiukaze ne per la nuboj, sed per la spuroj, *Sir*“, mi ridis. „El tiuj dudek ses ĉevaloj ok estis hufferitaj kaj dek ses ne havis hufferojn; la rajdantoj estis dudek tri blankuloj kaj tri indianoj. La estro de la tuta trupo estas blankulo, kiu lamas per la dekstra kruro. Lia ĉevalo supozinde estas ruĝfela virĉevalo. Sed la indiana ĉefo, kiu ĉeestis, rajdas aŭ nigran virĉevalon aŭ brunan, kaj mi pensas, ke li estas suo, de la tribo de la ogelaloj.“

La mieno, kiun la dikulo nun faris, tute ne priskribeblas. Lia buŝo estis malferme per miro, kaj la malgrandaj okuletoj fikstrigardis min per esprimo, kvazaŭ mi estus fantomo.

„*The devil!*“ li fine vokis. „Vi ja revas, ĉu, *Sir*?“

„Vidu mem!“ mi respondis koncize.

„Sed kiel Vi volas scii, kiom da blankuloj aŭ *indsmen*:oj ili estis? Kiel Vi volas scii, kiu ĉevalo estis bruna aŭ nigra, kiu rajdanto lamas kaj al kiu tribo la ruĝhaŭtuloj apartenis?“

„Mi petis Vin vidi mem! Kaj tiam ja klariĝos, kiu havas la pli bonajn okulojn, ĉu mi, la *greenhorn*, aŭ Vi, la sperta okzidentulo.“

„Bele! Ni vidu! Venu, *Sir!* *Greenborn* kaj diveni, kiuj tiuj fiuloj estis!“

Ridante li hastis al la indikita loko, kaj mi malrapide sekvis lin.

Kiam mi reatingis lin, li estis okupiĝanta tiel diligente per la rigardo de la spuroj, ke li ne atentigis pri mi. Nur kiam li estis esplorinta la ĉirkaŭon plej detale ĉirkaŭ dek minutojn, li venis al mi kaj diris:

„Verece, Vi pravas! Estis dudek ses, kaj dek ok ĉevaloj ne havis hufferojn. Sed la kromaĵo estas sensencaĵo, pura sensencaĵo. Ili restadis tie ĉi kaj forrajdis en tiun direkton. Plue oni vidas nenion.“

„Do venu, *Sir!*“ mi diris. „Mi volas montri al Vi, kian sensencaĵon la okuloj de *greenborn* ekvidas!“

„*Well*, mi scivolas!“ li ridante kapjesis.

„Vidu pli detale al la hufspuroj! Tri ĉevaloj estis tenataj aparte, kaj ne estis kunligitaj vice, sed kruce. Tiuj do ĉiukaze estis indianaj ĉevaloj.“

La dikulo surgenuiĝis pro detale mezuri la distancon de la unuopaj hufpremaĵoj. La herba tero malsekis, kaj la spuroj estis sufiĉe bone videble al kutimiĝinta okulo.

„*By Jove*, Vi pravas!“ li vokis mirigite. „Estis indianaj ĉevaloj.“

„Do, nun kunvenu pli antaŭen, tien al la malgranda akvoflako! Tie ĉi la *indsman*:oj lavis iliajn vizaĝojn, kaj reŝminkis iliajn vizaĝojn en la militaj koloroj. La farbo estis kunmiksita kun ursgraso. Ĉu Vi vidas la ringecajn enpremaĵojn en la softa tero? Tie staris la farbopotetoj. Estis varme, kaj la farboj tial fluiĝis kaj gutis. Ĉu Vi rimarkas tie ĉi en la herboj nigran, ruĝan kaj du blujn gutojn, *Sir?*“

„*Yes*, verece estas fakto!“

„Kaj ĉu ne nigro-ruĝo-blua estas la militaj koloroj de la ogelaloj?“

Li nur kapjesis. En liaj trajtoj nun esprimiĝis io kiel suspekto, kune kun profunda pensado.

Mi ne atentigis pri tio kaj pluis:

„Nu plue! Kiam la trupo alvenis tie ĉi, ĝi haltis tie flanke de la marĉa flako. Tion indikas la hufpremaĵoj, kiuj pleniĝis per akvo. Nur du antaŭenrajdis, do certe la estroj. Ili unue volis esplori, kaj la aliaj intertempe devis resti tie. Vidu tiun spuron en la marĉaĵo! Unu ĉevalo kun hufferoj, la alia sen. La hufoj de tiu dua enpremiĝis malantaŭe pli profunde ol antaŭe. Do sidis indiano sur ĝi. La alia rajdanto estis blankulo, ĉar lia ĉevalo havis hufferojn kaj la hufoj enpremiĝis antaŭe pli profunde ol malantaŭe. Vi certe konas la diferencon de la maniero, en kiu *indsman* kaj blankulo sidas sur ĉevalo, ĉu?“

„*Sir*“, li diris, „mi preskaŭ kredas, ke Vi —“

„Bone!“ mi interrompis lin. „Nun atentigu bone! Ses paŝojn pli antaŭe la ĉevaloj mordis unu la alian. Sed tion faras post tia longa rajdado, kian tiuj ĉi homoj hodiaŭ estis farintaj, nur virĉevaloj. Ĉu Vi komprenas?“

„Sed kio nu diris al Vi, ke ili mordis unu la alian, ha?“

„Unue la pozicio de la hufpremaĵoj. La indianĉevalo tie ĉi saltis al la alia. Tion Vi ja konfesu. Kaj due, rigardu la harojn, kiujn mi tenas tie ĉi en la mano! Mi trovis ilin antaŭe, kiam mi ekzamenis la spurojn sen Vi. Tiuj estas kvar kolharoj kun helbruna

koloro, kiujn la indianĉevalo ŝiris el la alia, kaj tuj faligis ilin. Sed pli antaŭe mi trovis tiujn ĉi du vostharojn, kaj per la pozicio de la hupremaĵoj mi vidas, ke la indianĉevalo mordis la kolharojn de la alia, sed tuj estis recedigita de ĝia rajdanto, kaj tiam pelita antaŭen. Dum tio la alia ĉevalo transigis la kapon kaj ŝiris tiujn ĉi harojn el ĝia vosto, kiuj ankoraŭ restis pendinte en ĝia buŝo kaj tiam falis teren. La ĉevalo de la ruĝulo estas aŭ nigra aŭ bruna, kaj tiu de la blankulo estas ruĝa — venu plu! Ĉi tie la blankulo deĉevaliĝis pro grimpi sur la relvojan taluson. Lia spuro restis videble en la maldensa sablo. Vi povas vidi klare, ke li enpremis unu piedon pli profunden kaj pli forte ol la alian. Li do lamas. Cetere tiuj homoj estis elstare negardiĝe. Ili klopodis eĉ ne ete nerimarkebligi iliajn spurojn. Konsekvence ili supozas sin esti tre sekure, kaj tio ĉi povas havi nur kaŭzojn.“

„Kiujn?“ li koncize demandis.

„Aŭ ili estis volontaj igi ankoraŭ hodiaŭ longan distancon inter ilin kaj iliajn persuktantojn, sed mi ege dubas pri tio, ĉar estas videble per iliaj spuroj, ke iliaj ĉevaloj estis sufiĉe elĉerpita kaj lace. Aŭ ili sciis, ke pli granda aro de iliaj kunuloj estis en la proksimo, al kiuj ili povis recedi. Tiu konkludo ŝajnas pli verŝajne al mi. Kaj ĉar tri unuopaj *indsman*:oj ne tiel facile aligas al pli ol dudek blankuloj, mi do supozas, ke tie en la norda direkto troveblas elstare altnombra aro da oĝelaloj, al kiuj nun la dudek tri *railtroubler*:oj renkonte rajdis.“

Estis vere amuzige vidi nun, kun kia stranga mieno mia kunulo rigardis min de la kapo ĝi malsupren al miaj piedoj.

„*Mann!*“ li fine vokis. „Kiu estas fakte Vi, ha?“

„Mi ja ĝin diris al Vi.“

„*Pshaw!* Vi ne estas *greenborn*, kaj ankaŭ ne librofaristo, kvankam Vi kun Viaj brilpurigitaj botoj kaj Via dimanĉa vestaĵo tute aspektas tiel. Vi estas tiel brillekita kaj pure, ke Vi ĵus nun povus aperi en teatraĵo, en kiu aperu okcidentulo sur la scenejo. Sed inter cent veraj okcidentuloj estas apenaŭ unu, kiu kapablas legi spurojn kiel Vi. *By Jove*, mi estis pensinta, ke mi ankaŭ kapablas iom, sed Vian rangon en tiu fako mi ne atingos, *Sir!*“

„Kaj tamen mi estas libroskribisto. Sed mi jam antaŭe estis trarajdinta tiun ĉi prerion de nordo suden kaj de la oriento al la plej fora okcidento. Tio estas la kaŭzo, ke mi tiel sufiĉe kapablas la spurolegadon.“

„Kaj Vi vere volas iri supren en la Windriver-montojn, ĉu?“

„Ho jes.“

„Sed, *Sir*, ajn kiu volas sukcesi tion, tiu ja devas esti eminente pli ol nur bona spuroleganto, kaj je tio — ne pensu malbone pri mi — Vi ŝajne havas mankon.“

„Kial?“

„Ajn kiu havas tiel danĝeran vojon antaŭ si, tiu ne iras tiel trafe maltrafe en la nekonataĵon kiel Vi, sed li antaŭ ĉio serĉelektas bonan ĉevalon. Ĉu Vi komprenas?“

„Tion mi faros.“

„Sed kie?“

„Nu, ĉevalo aĉeteblas ĉe ĉiu stacio, eĉ se ĝi estus maljuna ĉarĉevalaĉo. Sed kiam mi tiam havos ĉevalon, mi poste haviĝos mustangon el ajn iu sovaĝa aro, kiu ĝustas al mi.“

„Ĉu Vi? Ha! Ĉu Vi estas tia rajdanto? Ĉu Vi povas mastri mustangon? Ĉu tie supre estos ĉevaloj?”

„Vi forgesas, ke ĵus nun estas la sezono, en kiu la bubaloj kaj mustangoj komencas iliajn aromigradojn. Mi estas konvinkita, ke mi trovos aron inter tie ĉi kaj la Teton-montoj.”

„Hm! Do Vi estas rajdisto. Sed kio pri la pafado?”

„Ĉu Vi volas ekzameni min, *Sir?*” mi ridis.

„Tutcerte”, li serioze kapjesis. „Vere mi havas intencon per tio.”

„Ĉu oni rajtas ekscii, kiun?”

„Pli poste. Unue Vi pafu! Alportu Vian pafilon!”

Tiu mallonga interludo kaŭzis amuzon al mi. Mi simple estus povinta diri al tiu homo, ke mi estas Old Shatterhand, sed mi preferis forsilenti tion. Li devis ekkoni tion mem. Mi do iris al la vagono pro alporti la kovrotukon, en kiujn miaj pafiloj estis volvitaj. Oni rimarkis tion, kaj tuj la kunvojaĝantoj formis duoncirklon ĉirkaŭ ni ambaŭ. La amerikano, kaj aparte la loĝanto de la okcidento ja konate neniam nenionfarante preterpasigas ŝancon vidi, kiel pafilo estas lanĉata.

Mi komencis disvolvi la kovrotukon.

„Behold, Henry-pafilo!” la dikulo vokis. „Vera, ĝusta Henry-pafilo! Kiom pafojn ĝi havas, *Sir?*”

„Dudek kvin.”

„Ha! Tiu estas terura armilo! *Mann*, mi envas Vin pro tiu armilo!”

„Tiu ĉi armilo estas pli ŝate al mi.”

Dum tio mi elvolvis mian pezan ursmortigilon.

„*Pshaw!* Glata, bonpurigita pafilaĉo!” la dikulo diris malestime. „Mi ja plie preferas malnovan rusthavantan Kentucky-pafilon aŭ mian malnovan krudpafilon tie!”

„Ĉu Vi ne volas foje fari vidon al la farinto, *Sir?*” mi demandis lin, etendante la pafilon al li.

Li faris vidon al la enkaŭstikita marko, kaj surprizigite paŝon malantaŭen.

„Pardonu, *Sir?*”, li vokis, „tio certe estas alia afero. Ne multaj de tiuj pafiloj plu ekzistas. Mi aŭdis, ke Old Shatterhand havas unu. Se mi nun ankaŭ scius, ke Vi vere estas bona pafanto, tiukaze —”

„Tiukaze kio?”

„Hm! Pri tio ni parolos poste. Unue provu Vian kapablon!”

„Bone! Difinu, kiun celon mi trafu, *Sir!*”

„Unue ŝargu!”

„Ba, tio ne necesas. La kartoĉoj enestas seke.”

„*Well*, do pafu pro mi tiun birdon de la arbedo!”

La indikata birdo sidis sur la arbedo en distanco de ĉirkaŭ ducent paŝoj. Trafu ĝin do certe ne estus estinta elstara majstraĵo. Sed altege super ni, mi estis rimarkinta rabo-birdon, kiu staris kiel fiksa punkto en la aero, kaj mi nun vidis alten.

„Ĉu Vi vidas la birdon tie supre, *mes'sur:oj?*” mi demandis vidante ĉirkaŭen. „Mi malsuprenigos tiun.”

„Tio neblas!“ la dikulo vokis. „Tion eĉ ne kapablas la malnova Sans-ear aŭ Old Firehand!“

„Ni vidu!“

Mi levis la pafilon kaj lanĉis.

„For!“ la dikulo ridis. „La pafo timigis la birdon. Ĝi fuĝis, saviĝis malantaŭ la relvojan taluson.“

„Ne, ĝi ne cedis, sed estis trafita“, mi diris, deŝultranta la pafilon. „Do iru transen sur la taluson, ĝi falis tien, ĉirkaŭ okdek paŝojn for de tie ĉi!“

Mi montris per la mano al la loko, kaj tuj kelkaj el la ĉirkaŭstarantoj kuris tien. Ili alportis la birdon, kiu sendube estis trafita. Mia kunulo alterne rigardis la birdon kaj min.

„Trafite, verece trafite! *Sir*, tiu estis pafo, kian mi neniam antaŭe estis spertanta! Ŝajne Vi ĝis nun intencadis fari ioimete ian kaŝludon kun mi. Sed nun ĝi estas je la fino! Mi scias, kion mi pensu pri Vi. Do kunvenu iom flanken kun mi!“

Mia kunulo tiris min for de la aliaj spuroj, tien, kie la ĉevalspuroj estis plej klare videblaj. Tie li elpoŝigis paperon kaj metis ĝin sur unu de la premsignojn.

„*Well*, estas fakte tiel!“ li diris pripensante. „*Sir*, nu diru al mi, ĉu Vi vere estas la mastro de Via tempo, aŭ ĉu Vi povus fari alian rajdadon antaŭe!“

„Mi povas fari ajn kion mi volas“, mi deklaris.

„Bonege! Do mi volas diri ion al Vi. Ĉu Vi eble jam aŭdis pri Stephen Moody, kiun oni kutime nomas „Akrokulo“?“

„Jes, laŭdire li estas brava okzidentulo, certe estas unu el la plej bonaj vojtrovisto de la montaro kaj parolas plurajn indianajn dialektojn.“

„Mi estas tiu Moody, *Sir*!“

„Ion similan mi jam antaŭsciis. Jen mia mano! Ĝojas min elkore renkonti Vin, *Sir*.“

„Ĉu vere? Nu, eble ni interkonatiĝos unu la alian pli bone poste. Fakte mi devas paroli kelkajn seriozajn vortojn kun unu Monk. Dum la lasta tempo li estis la estro de aro de *bushheader*:oj kaj ĉevalŝtelistoj, tute apartigite de tio, pri kio li estis kulpiĝinta en la antaŭa tempo. Nun li formigris kun sia bando plie okzidenten, kaj mi sekvas lin. La papero en mia mano estas la detala figuraĵo de la du malantaŭaj hufoj de lia ĉevalo. Ili kongruas al tiuj spuroj, kaj ĉar Monk lamas per la dekstra kruro, mi estas konvinkita, ke li estas la estro de tiuj *railtroubler*:oj.“

„Monk, ĉu? Kiu estas lia antaŭnomo?“

„Lew, Lewis. Sed li kutime havas diversajn nomojn.“

„Lewis Monk, ĉu? Ha, mi aŭdis pri tiu! Ĉu li ne estis la librotenisto de la naftoprinco Rallow? Li fiforkaŝiris de sia mastro kun eminenta sumo!“

„Jes, estas li. Li delogis la kasiston malplenigi la kason kaj foriri kun li. Tiam li mortpafis lin. Monk estis persekutata de la polico, kaj mortigis du konstablojn, kiuj volis kapti lin. Li estis arestata en New Orleans, ĵus kiam li volis surŝipiĝi. Li sukcesis ankaŭ fuĝi de tie, mortbatante karceriston. Tiam li iris en la okzidenton. Io alia ne restis al li, ĉar oni deprenis la rabaĵon de li. Ekde tiu tempo li faris krimaĵon post krimaĵon, kaj estas tempo, ke tio iĝos al fino.“

„Vi volas kapti lin, ĉu?“

„Li estu sub mia forto, morte aŭ vivante.“

„Do Vi havas personan bilancon farenda kun li, ĉu?“

Moody kelkan tempon vidis malsupren antaŭen kaj tiam respondis hezite:

„Mi ne ŝate parolas pri tio, *Sir*. Eble mi rakontos al Vi pri tio, kiam ni unue estos konatiĝinta iom pli bone. Kaj ke ni estos konatiĝintaj, tion mi esperas, *Sir*. Estas mirakleca hazardo, ke mi troviĝis ĵus en tiu ĉi trajno, sed tamen mi ja certe estus ankoraŭ longe serĉonta la spuron de tiu Monk, se Old Shatterhand ne estus preminta mian nazon sur ĝin.“

„Ha!“ mi ridis. „Vi kredas esti rimarkinta ion!“

„Ĉu kredas?“ li diris. „*Pshaw*, mi scias.“

„Kio, se Vi tamen eraras?“

„Tute neeble! Germano, kiu skribas librojn, kiu riskas solan vojaĝon en la Teton-montojn, kiu peze kunportas Henry-pafilon kaj malnovan ursmortigilon, kiu estas majstro de la spurolegado kaj pafado — *Sir*, ajn kiu ne rekonas tiun viron esti Old Shatterhand, tiu certe loĝas sur la luno, sed ne en la sovaĝa okcidento kiel Stephen Moody. Do forsilentu Viajn elturniĝojn kaj lasu min finparoli! Ke la estro de la *railtroubler*-oj lamas kaj rajdas ruĝfelulon, tion mi ne estus ektrovinta, sed tamen ĵus tio estas kaŭzanta mian supozon. Mi forlasos la trajnon tie ĉi pro sekvi la spuron. Ĉu Vi volas akompani min, *Sir*?“

„Hm! Ĉu ne estus pli bona al Vi aliĝi al la viroj, kiuj post mallonga tempo venos al la neksta stacio pro persekuti la *railtroubler*-ojn?“

„Ne. Ne parolu al mi pri tia persekuto! Unu sola okcidentulo pezas plie je tio ol tuta arego da tiaj alkurinta pulvoposedantoj. Sed mi fakte devas esti honeste kaj konfesi, ke vere ne estas malgranda risko kuri malantaŭ tiaj homoj. Dum tio la vivo de viro pendas nur de unu bruldifekta haro. Sed mi pensas, ke Vi estas la viro, kiu serĉas aventuron kaj ankaŭ povos sukcesi ĝin, kaj jen Vi trovas unu, kiu ne povus esti pli ekscitiga.“

„Tio ĝustas“, mi kunsentis. Sed neniam estis estinta mia pasio enmiksiĝi en la aferojn de aliaj homoj. Tiu Lew Monk tute ne koncernas min, kaj mi ja ankaŭ ne scias, ĉu mi ĝustos al Vi.“

Li palpebrumis kun siaj malgrandaj okuletoj ŝerceme kaj ridetis.

„Vi certe volis diri ĝin renverse: ĉu mi ĝustas al Vi! Nu, pri tio Vi ne afliktiĝu. ‚Akrokulo‘ ne estas la homo, kiu interkonatiĝas kun la unua alvenanta okcidentulo; Vi senpense povas fidi pri tio. Mi prefere restas sole, kaj kiam mi aliĝas la alia, mi devas havi fidon pri li, kaj li estu plena ulo. Ĉu komprenite?“

„En tiu rilato mi estas ĵus kiel Vi. Tie ĉi oni trovas kamaradon, kuŝiĝas flanke de li pro ripozi, kaj estas kadavro je la sekvanta mateno. Sed la kamarado forrajdas plenĝoje kun sia rabaĵo.“

„*Zounds*, ĉu Vi do pensas, ke mi estas tia fiulo, *Sir*?“

„Ne. Vi estas honesta viro, tion oni povas vidi. Jes, do plie, Vi eĉ apartenas al la polico, kiu ja ne toleras fiulon inter si.“

Moody ektimiĝis kaj lia vizaĝo ŝanĝis sian koloron.

„*Sir*!“ li vokis. „Kio ekregas Vin?“

„Kvietu, Sir! Via tuta aspekto ja ne estas tre policeca, sed ĵus tial Vi eble estas sufiĉe taŭga detektivo. Vi ja ne faris aludon, sed mi tamen scias, kion mi pensu. Estu pli gardiĝe estonte! Se en tiuj ĉi latitudoj vastiĝas, ke ‚Akrokulo‘ transmigras la prerion nur tial, pro kiel sekreta policisto kaŝe trovi kaj sendanĝerigi kelkajn perditajn *gentleman*:ojn, Vi tiukaze facileble baldaŭ estos farinta Vian lastan pafon.“

„Vi eraras, *Sir!*“ li trompe provis konvinki min.

Sed mi neakceptis.

„Certe ne. La aventuro plaĉas al mi, kaj mi tuj volus aliĝi al Vi pro fari petolaĵon al tiuj *railtroublers*:oj. La danĝero ja ne povus timigi min, ĉar ĝi ja atendas niaspeculon ĉie sur la prerio. Sed ke Vi volas kaŝiĝumi antaŭ mi, tio retenas min. Kiam mi alianciĝas kun homo, mi sciu, kiel mi devas taksi lin.“

Li pripense vidis sur la teron, tiam li levis la kapon kaj diris:

„Bone, *Sir*, Vi sciu, kiel Vi devas taksi min, tiel ke mi ĝin scias nun pri Vi, kvankam Vi ne jam klare min vidigis Vian blazonon. Jes, mi estas oficisto de la Privata Detektiva Korpuso de doktoro Sumter en St. Louis. Mia tasko estas serĉi kaj kapti fuĝintaj krimistoj en la forlando, certege ne facila vivo, sed mi koncentriĝas mian tutan forton pri tio. Kial mi faras tion, tion mi klarigos al Vi pli poste, kiam ni havos la tempon. Estas malgajiga rakonto. Kaj nun diru, *Sir*, ĉu Vi volas akompani min?“

„Mi volas! Jen mia mano, *Sir!* Ni estu bonaj kamaradoj kaj partigu ĉiun mizeron kaj danĝeron. Kaj — nun mi konfesas, ke mi estas la viro, kiun oni nomas Old Shatterhand.“

La dikulo ĝoje skuis mian manon.

„Tio estu promeso, *Sir!* Estu dankata pro tio! Mi esperas, ke ni sufiĉe bone alĝustigos. Sed tenu la *Sir*:on for de mi, kaj pli bone nomu min Stephen! Tio estas koncize kaj trafe, kaj mi scias ekzakte, al kiu Vi parolas. Mi nun certe ankaŭ rajtas ekscii, kiel mi nomu Vin, ĉu ne?“

„Simple nomu min Charley. Tio sufiĉas!“ Tiam mi montris transen al la akcidentejo. „Sed vidu, la taluso estas rebonigita, kaj la reloj denove transvetureble. Oni baldaŭ envagoniĝos.“

„Do mi alportu Viktor:on. Vi ne ektimiĝu pri ĝi. Ĝi aspektas kiel nenio plu, sed ĝi estis portanta min dek du jarojn, kaj mi ne estus ŝanĝanta ĝin pro la plej bona vetkura besto de la mondo. Ĉu Vi ankoraŭ havas ion en la vagono?“

„Ne. Mi entute volas foriĝi de tie ĉi sen longa adiaŭo.“

„Prave, Charley. Ju pli malpli oni scias pri ni, des pli sekuraj ni estas.“

Stephen paŝis al la vagono, en kiu troviĝis lia ĉevalo, kaj lasis ĝin malfermi. La tereno tute ne taŭgis pro malŝarĝi ĉevalon, kaj ankaŭ ne tieis ramplo pro tio. Sed eblis, kiel evidentiĝis, ankaŭ sen ramplo.

„Viktor, *come on!*“

Per la voko de la ĉasisto la maljuna besto unue etendis la kapon pro vidi al la afero, pripense faldis la orelojn malantaŭen, kaj tiam eliĝis per ege riskema saltego sur la taluson. Ĉiuj, kiuj spektis tiun salton, aplaudis. La besto ŝajnis kompreni tion. Ĝi svingis la voston kaj elpuŝis laŭtan blekon.

La ĉevalo tute ne aspektis, kvazaŭ ĝi havus sian nomon Viktor, Venkisto kun unu nuanco de rajto. Estis maldika, longakrura ruĝfelulo, kiu certe estis dek kvin jarojn aĝe. La kolharojn li estis tute perdintaj, la vosto estis nur kelkaj unuopaj hararoj plu, kaj la oreloj aspektis kiel tiuj de kuniklo en plurfoja grandigo. Tamen mi havis ĉian respekton pri la ĉevalo, ankaŭ ĉar mi rimarkis, ke ĝi ekpiedbatis kaj mordis, kiam unu el la homoj ŝatante etendis la manon al ĝi. Viktor havis, kiel oni rimarkas, grandan similecon al la maljuna Tony de mia bona Sans-ear. La besto surhavis selon kaj bridilojn. Stephen fiksigris la selrimenon, suriĝis kaj rajdegis malsupren laŭ la kruta taluso sen vidi reen. Oni tute ne plu atentigis pri ni. Ni ja estis fremduloj, kaj tial neniu zorgiĝis pri tio, ke ni forlasis la trajnon.

Malsupre je la taluso Akrokulo haltis.

„Ĉu Vi nun vidas, Charley, kiel bone nun estus, se Vi havus ĉevalon?“ li diris.

„Ne longe daŭros ĝis mi havos unu“, mi konsolis lin. „Per la helpo de Via Viktor mi certe kaptos unu por mi.“

„Ĉu Vi? Tiun ja devos kapti mi, ĉar mi promesas al Vi, ke Vi ne povas rajdi Viktor:on, kvankam Vi estas Old Shatterhand. Li ne portas iun alian homon, nur sole min.“

„Tion ni vidos.“

„Sed estas tiel, mi asertas ĝin al Vi. Ni povus, pro ke la irado ne elĉerpiĝu Vin troe, intertempe ŝanĝi la ĉevalon, sed Viktor certe deĵetos Vin, kaj tiel Vi estas kondamnata al marŝado, ĝis ni trovos mustangaron. Tio malagrablas, ĉar tiel ni antaŭeniĝos nur malrapide, kaj mankos multan tempon. Sed vidu, tie envagoniĝas la homoj, la trajno plu-veturas!“

Estis, kiel li diris. La maŝino vaporumis, la radoj moviĝis, kaj la trajno rulis plu al la okcidento. Post malmultaj momentoj ĝi estis malaperinta el niaj okuloj.

„Pendigu Vian pezan pafilon de mia seltenilo!“ Akrokulo konsilis.

„Bona ĉasisto neniun momenton disiĝas de sia pafilo“, mi malakeptis. „Mi dankas al Vi, Stephen. Antaŭen!“

„Mi rajdos malrapide, Charley.“

„Lasu Viktor:on almenaŭ forte paŝadi! Mi estas bona iradanto kaj elteniĝos.“

„Well, nu venu!“

Mi surmetis la kovrotukon, pendigis la pafilon de la ŝultro, surŝultrigis la ursmort-igilon kaj ekpaŝis je la flanko de la rajdanto. La persekuto de la *railtroubler*:oj komencis.